

Jubilea Verkaro dediĉita al Prof. D-ro Seiho Nishi. Okajimas *Folia Anatomica* Vol. 28, 1956 (621 p., multaj entekstaj desegnoj kaj ekstertekstaj folioj kun fotoilustraĵoj).

La verkaro enhavas 43 kontribuaĵojn el la homa kaj kompara anatomio, el kiuj 7 estas en Esperanto, ampleksante la sesonan parton de la libro. La aliaj kontribuaĵoj estas en la angla, franca kaj germana lingvoj. Lernintoj kaj kolegoj de prof. Nishi en kaj ekster Japanio kontribuis.

Ne estas mia tasko recenzi la enhavon de la verkaro; tio ankaŭ ne estas en mia kompetento. Mi nur volas emfazi la gravan fakton ke en tiu ĉi impona, pure scienca publikigaĵo nia internacia lingvo funkcias kiel ĝi devas funkcii, nome kiel rekonita scienca lingvo. Pro la fakto ke la volumo estas redaktita en Esperanto (titolpaĝo, kovrilo kaj dediĉa artikolo) Esperanto eĉ ĝuas pli favoran lokon ol la tri aliaj sciencaj lingvoj. Ne estas pro pedanteco ke mi substrekas, ke ankaŭ en tio Esperanto ricevis nur tion pri kio ĝi plene rajtas: la rolon de supernacia komunikilo. Ni esprimu nian ŝaton al la redakcio kaj eldonisto, kiuj efektive pruvis per tio kompreni la veran destinon de Esperanto. Ni ne jam rajtas postuli ke oni eldonu verkojn nur en Esperanto; por tio la tempo ankoraŭ ne maturiĝis, eĉ ne en Japanio.

Al ĉi tiuj linioj mi volas doni konkludon. Ni deziras ke en la estonteco sciencaj verkoj aperu nur en Esperanto. Tio estas deziro, ne postulo, kompreneble. Ni esperantistaj sciencistoj ja estas ankoraŭ tro malmultaj por rajti postuli. Ni ankaŭ publikigas tro malmulte niajn sciencajn verkaĵojn en Esperanto.

Tamen estas necese, regule prezenti tutesperantajn artikolojn al la redakcioj de sciencaj periodaĵoj. Tio estas necesa por konsciigi al ili ke ankoraŭ ekzistas lingvoproblemo kaj ke Esperanto prezentiĝas kiel solvo. Tia alsendo ne restu maloftaĵo, sed estu konstante ripetata, ne de solulo, sed de pluraj sciencistoj. Nur tiam redaktoroj alkiutimiĝos al la ekzisto de Esperanto kaj al ĝia povo kaj pretendo: esti la scienca lingvo.

Tamen, estas unu nepra kondiĉo. Ĉiu sciencisto kiu petas akcepton por sia kontribuaĵo en Esperanto, estu konata kiel prudenta, ne fanatika homo. Tiel longe kiel Esperanto estas novaĵo en sciencaj periodaĵoj, ĝia akcepto dependas same de la kvantoj da bonvolemo kaj estimo kiujn ĝuas ĝiaj porantoj, kiel de ĝiaj propraj meritoj.

G. F. Makkink.

GRAVA EVENTO EN LA ESPERANTO-TERMINOLOGIO: LA APERO DE LA „SCIENCA KAJ TEKNIKA TERMINARO” - STT -

La internacia lingvo Esperanto de longtempe pruvis sian kapablon ne nur sur la kampo de la komuno lingvo, sed ankaŭ sur tiu de la teknika kaj scienca faklingvo. La ĝisnuna **PLENA VORTARO** de **ESPERANTO**, bonkonata gvidanta difinvortaro duonoficiala de la Esperantistoj, enhavis krom la komunlingvaj vortoj nur limigitan teknikan-sciencan vortrezoron. Kvankam multnombraj fakvortaroj aparte aperis iom post iom, tamen ili plej ofte nun ne plu estas haveblaj. Bedaŭrinde eĉ la famkonata **ENCIKLOPEDIA VORTARO** de tekn. d-ro Eugen Wüster (Aŭstrujo) ne tuta estas disponebla por la fakuloj, ĉar ĝi aperis nur por la unua duono de la alfabeto. Pro tio estiĝis pli kaj pli bezono pri teknika-sciencaj difinvortaro, en kiu la vortrezoro de ĉiuj ĝis nun aperintaj fakvortaroj estas kunigita.

Jam en 1949 la tiama delegito de la **INTERNACIA SCIENCA ASOCIADO ESPERANTISTA (ISAE)** por Germanujo, la kemiisto d-ro Kurt Dellian en Munkeno iniciatis tian kunigantan sciencan kaj teknikan difinvortaron, kiu celis suplementi la Plenan Vortaron. Li unue ellaboris principojn (direktivojn) por la terminologia kunlaborado kaj la aranĝo de unueciĝa fakvortaro.

Tiam, dum la sekvintaj jaroj, la ellaborado de tiu ampleksa verko okupadis la intertempe kreitan **TERMINOLOGIAN SEKCION** de **I.S.A.E.** kaj kuŝis ĉefe en la manoj de dipl. ing. Rudolf Haferkorn en Berchtesgaden, Germanujo, kiu prenis sur sin en 1954 la taskon de delegito de ISAE por Germanujo, kaj en 1956 tiun de gvidanto de la Terminologia Sekcio de ISAE. Komence de la jaro 1954, post plurjara streĉa laborado, s-ano Haferkorn pretigis la manuskripton de la verko. Malsukcesis la provo aperigi la verkon en Eŭropo, ĉar tie la du aŭtoroj ne trovis eldonejon kiu estis preta preni sur sin la finan riskon. Fine ili sukcesis en Japanujo, dank' al la helpo de la japanaj kolegoj, precipe de la profesoroj Nishi kaj Yamazoe, kaj d-ro Tadokoro de la Gunma Universitato en Maebashi. La eldonadon finance ebligis japana kuracisto, d-ro Hideo Shinoda, kiu afable pruntedonis konsiderindan monsumon por la presado. Sinjoro Ŝihej Mijake, prezidanto de la Japana Esperanto-Instituto en Tokio, definitive deklaris sin preta preni sur sin la taskon de eldonado, kaj dum junio 1954 la manuskripto iris Japanujon. S-ro Mijake komisiis la firmaon Kenkyu-sya, tre fama presejo en Tokio, prizorgi la presadon.

La difinvortaro efektive aperis en Tokio fine de 1956 sub jena titolo:

SCIENCA KAJ TEKNIKA TERMINARO - STT -

Kiel propono aŭ provizora skeleto destinita por komplementi
la PLENAN VORTARON de SAT

verkita de

ing. Rudolf Haferkorn kaj kem. d-ro Kurt Dellian
en kunlaborado kun univ. prof. d-ro F. J. Belinfante
(Usono), instigita per diskutado en Terminologia Sekcio de
I.S.A.E.

eldonita de Japana Esperanto-Instituto, Tokio 1956.

La STT enhavas precipe tiujn terminojn kiuj ne troviĝas en la Plena Vortaro, kaj ĝi montras nur tiujn konatajn kiuj estas vere necesaj kiel fundamentaj radikoj. STT estas baza skeleto en kelkaj detaloj tre amplekse elverkita. Ĉiuj posedantoj de la PV, kiuj legas aŭ skribas teknikajn artikolojn, ankaŭ nepre bezonas STT'n kiel komplementon.

Jenaj fakoj estas iom detale pritraktitaj: aeronautiko, elektrotekniko, fiziko (inkluzive de atomfiziko), kemio, maraferoj kaj ŝipotekniko, maŝinfako, matematiko, medicino, meteorologio, radiofako, telekomunika tekniko. Kelkajn gravajn terminojn ĝi enhavas pri jenaj fakoj: arkitekturo, botaniko, fotografio, juro, komerco, trafiko, zoologio.

Kompreneble la STT larĝe allasas kritikojn kaj kompletigojn; ja tio helpas plivigli la kunlaboradon en la Terminologia Sekcio. Tial STT estos unu el la bazoj por estonta pli ampleksa verko, en kiu efektiviĝos kolekto de aparte elverkitaj detalaj fakterminaroj de ĉiuj fakoj de la homa scio, do vera PLENA SCIENCA KAJ TEKNIKA TERMINARO! Laŭ la rekomendo de d-ro Eugen Wüster tiu estonta kunlaborado de la Esperantistoj devas baziĝi sur la jam ekzistantaj terminaroj de International Standard Organization (ISO) kaj Fédération Internationale de Documentation (FID). D-ro F. J. Belinfante, profesoro de Department of Physics, Purdue University, West Lafayette, Indiana, Usono, kiu havas esencan meriton pro la kontrolado de la STT, deklaris sin preta kunlabori ankaŭ ĉe la ellaborado de la planita nova eldono de la Plena Vortaro, kiu laŭ la intenco de Prof. Gaston Waringhien, Professeur Agrégé de l'Université à Paris, post kelkaj jaroj aperos sub la titolo PLENA ILUSTRITA VORTARO (PIV). Waringhien, kiu mem redaktas la komunlingvan parton, komisiis la ĉefverkinton de la STT, funkcii kiel redaktanto de la teknika-sciencia parto de tiu planita difinvortaro. La kunlaborantoj

de tiu ampleksa verko utiligos la STT'n por siaj propraj fakoj. La PIV estos vulgariga vortaro; tio signifas ke la kompilantoj enprenos nur tiajn teknikajn terminojn, kiuj koncernas ĝeneralan, ne specialigitan kulturon, t.e. minimume la terminoj, kiujn devas koni kandidato al abiturienta ekzameno plus la vortoj kaj nocioj kiujn kulturita homo povas renkonti en la vulgarigaj artikoloj de bonaj ĝeneralcelaj revuoj aŭ gazetoj.

Sed tiu planita PIV realiĝos nur post kelkaj jaroj. Intertempe la ĵus en Japanujo aperinta STT favore plenigas en la teknika-sciencia kampo la malplenaĵon, kiun la fakuloj sentadas kaj ankoraŭ dum pluraj jaroj sentos. Kvankam en ĝi certe ankoraŭ troviĝas eraroj, tamen ĝi kunhelpas prepari pli ampleksan kaj pli kompletan verkon. — R. H.

611.314(084) = 089.2

Morfologia atlaso de homa dentaro far Zoran Music, tradukita de Peter Zlatnar. Eldonis Slovenia Esperanto-ligo, Ljubljana (1956), poŝtfako 275, Jugoslavio. 1 \$. Koverto kun tekstlibro (12 p.) kaj 27 bildfolioj (kun 134 desegnoj, unuflanke).

La originala eldono en la slovena lingvo aperis en 1951. Ĝi servas kiel instruilo en dentoteknikaj lernejoj kaj stomatologiaj (buŝosciencaj) fakultatoj. La desegnoj montras la objektojn kvinoble pligrandigitaj kaj posedas indikojn pri la mezuroj. La figuroj aspektas tre klaraj kaj plastikaj. Kiel biologiisto mi ne volas tuŝi la fakajn meritojn de la atlaso, mi nur volas permesi al mi kelkajn rimarkigojn pri kelkaj terminoj.

En la figuroj troviĝas kelkaj mallongigoj, laŭ la klarigo *m* por „meza” kaj *d* por „dista”. Klarigoj pri Lab (lipa) P (palata), B (vanga) mankas. La figuroj montras ke „meza” koncernas la mezan ebenon, la medianan ebenon, kaj „dista” koncernas la malantaŭon. La uzo de „meza” por „mediana” estas „dangera, ĉar per „meza” oni ne elvokas la precizan imagon de „mediana.” „Dista” ne troviĝas en P.V.; Bricquet (Medicina Vortaro) donas: „distala = malproksima”. Bricquet do donas la laŭliteran tradukon de la greka vorto, kiu fakte ne kovras la fakan signifon: malantaŭa(e). Estas saĝe ne sekvi Bricquet-on, sed tenadi la fakan signifon de la vorto: malantaŭa (-e). Tamen ni ne prenu „dista” -n, sed „distala” -n, ĉar simile ni nun povas preni „proksimala” por antaŭa (-e).

Zlatnar en la atlaso uzis la esperantan vorton „proksima” kun la devia faka signifo de antaŭa. Tio ŝajnas al mi malrekomendinda, ĉar la signifoj de la Esperanta „proksima” (apuda) kaj de la faka vorto „proksima” (antaŭa) ambaŭ rilatas la situon de iu korpoparto, do